Vintra poezio: Kálmán Kalocsay

24 Decembro 2020 de La redakcio

Kálmán Kalocsay

VINTRO

Lamentas la arboj, ĉielen etendas
La brakojn skeletajn frostante kaj treme,
Ĝis fine la bona ĉiel' kompateme
Al ili ŝirmantan tapiŝon subsendas.

Kaj flokoj por blanka ĉiela kovrilo
Jen falas kaj falas kaj falas senĉese,
Ĝis sub ĉi kovrilo, ŝirmanta karese,
La arboj ekdormas en bona trankvilo.

Kaj dormas la arboj kaj dormas la Tero,
Kaj kvazaŭ morttuko la neĝo sin sternas,
Sed sube jam ĝermas la nova espero.

Ĉar nasko kaj morto senĉese alternas,
Kaj ĝermas la semo kaj falas la bero,
Sed vivas la Vivo, la Vivo eternas!

Vintra poezio: Hilda Dresen

26 Decembro 2020 de La redakcio

VINTRA LUNO

La plenlumaj vintronoktoj estas nedireble belaj.
Froste bluas kaj arĝentas neĝo sub la luna bril'.
Al ĉiel' en muta preĝo sin etendas la malhelaj
Nudaj branĉoj de pomarboj dormetantaj en trankvil'.

Kaj sopiroj arĝentecaj tra la koro milde glitas,
Similantaj al survitra delikata frostoflor',
Kaj de la fenestro rava nun foriri mi hezitas
Malgraŭ tempo enlitiĝa, malgraŭ la malfrua hor'.

En la ĉambro, kien falas luna brilo tra l' kurtenoj,
Kuŝas en timiga, prema senviveco la meblar',
Riproĉete alrigardi ŝajnas la kanapkusenoj,
Por fantoma ludo glitas la lunlum' laŭ la klavar'.

Jen, la luno tute male nun efikas al animo:
La lunbrilo froste morta ŝajnas plena de danĝer'.
Inter la senvivaj mebloj kaptas min subita timo:
Malgraŭ la lunlumo kvazaŭ kuŝus mi sub nigra ter'.